Rusio: arestitaj supozataj aŭtoroj de terorismaj agoj.

Havano, 28 jul (RHK) La federala servo de sekureco de Rusio (FSB) arestis sep personojn pro supozataj ligoj kun la atenco al la metroo de San Petersburgo okazinta la pasintan 3-an de aprilo, laŭ informis lokaj amaskomunikiloj.

Laŭ raporto de la speciala servo de tiu lando, la arestitoj estas personoj devenintaj el Centra Azio kiuj organizadis atakojn kontraŭ la fervoja transporto kaj en lokoj kun alta homa koncentriĝo.

La identeco de la arestitoj ankoraŭ ne estis diskonigita kaj la FSB daŭre efektivigas tiuj operaciojn policajn.